



# Novjorka Prismo

Numero 163

Aprilo 2007

## La Esperanto-Societo de Novjorko kore invitas vin al sia aprila kunveno

**DATO:** Vendredon, la 20-an de aprilo 2007, 6:30-9:00 pm

**LOKO:** United Federation of Teachers  
50 Broadway, Second Floor, Room A  
(inter Bowling Green and Exchange Place), NYC

**PROGRAMO:** 6:30 – Babilado kaj refreŝigaĵoj.

7:00 – *Libroeldonado en Esperanto*, prelego de Ulrich Becker. ★

### Protokolo de la kunveno de la 16-a de marto 2007

Stuart GREEN oficiale malfermis la martan kunvenon je la 7-a horo kaj 10 minutoj. Li notis, ke Rochelle F. GROSSMAN alportis la ekzaktan kvanton da refreŝigaĵoj bezonataj, kaj li invitis la grupon ĝui ilin.

Estis eraro en la unua frazo de la protokolo por la februara kunveno: la malĝusta monato estis indikata. Krom tiu eraro, la protokolo estis akceptata.

Sekvis kelkaj anoncoj. Scott PAGE diris, ke la Novjorka Publika Biblioteko havas du ekzemplerojn de *Step by Step in Esperanto* de Montagu BUTLER. Scott ankaŭ menciis, ke li sendis poŝtkarton al grupo en Francio, kiu petis poŝtkartojn en la lasta *Novjorka Prismo*.

Tomaso legis mesaĝon de Nijl BLONSTEIN, kiu petis pardonon pro sia foresto. Tomaso ankaŭ anoncis, ke lia meznivela kurso jam komenciĝis. Ĝi kunvenis en la restoracio Emma's Dilemma dimanĉe je la 3-a horo.

Post la anoncoj, Stuart legis mallongan pre-



legon pri la Esperanta alfabeto kaj pri provo je perfektigi ĝin.

Sekve, Tomaso ECCARDT kaj Jeff BLAKESLEE prelegis pri la uzo de Esperanto en filmoj. Tomaso montris partojn de la filmo *Idiot's Delight*, kiu enhavas Esperantlingvajn frazojn kaj ŝildojn. Jeff montris scenon de la filmo, en kiu horo kantas en Esperanto.

Je la 9-a horo Stuart oficiale fermis la kunvenon. ★

Protokolis: Jeff BLAKESLEE



### Laste vidigis

La 14-an de aprilo mi volontulis en la manifestacio "homo-maro" por postuli, ke la registaro regu karbonan dioksidon en la atmosfero por preventi inundojn kaj aliajn malbonajn efektojn de globa varmiĝo. Mi uzis ĉemizon kun bildo de Zamenhof, kaj per tio min rekonis Jake Schneider, juna esperantisto iama vizitinto al nia klubo, kiu ankaŭ partoprenis en la manifestacio. ★



– Tomaso ECCARDT

### IBM Plaza

La 1-an de aprilo pli malpli dek geesperantistoj renkontiĝis por babili en IBM Plaza. Ĉar estis aprila trompo-tago, oni rakontis ŝercajn enigmojn. Post du horoj, alvenis tri el miaj studentoj por leciono de la mez-nivela kurso. ★

– Tomaso ECCARDT



## Lasu tion al Jeeves fina parto

Sekvas la kvina parto de mia traduko de la rakonto "Lasu tion al Jeeves" de P.G. Wodehouse. Je la komenco de tiu ĉi parto, la amiko de Bertie, Corky, estas je sia nadiro. Li perdis sian fianĉinon al sia onklo, kaj nun tiu onklo malheredigis lin pro la malbela portreto de sia bebo kiun Corky produktis. Ĉu Jeeves povos trovi solvon de tia krizo?

"Corky, karulo!" mi flustris malforte. Corky staris apud la bildo. Lia vizaĝo estis rigida. Lia okulo esprimis ĉasitecon.

"Do, tio konkludas ĉion!" li murmuris rompite.

"Kion vi intencas fari?"

"Fari? Kion mi povas fari? Mi ne povas resti ĉi tie se li rompas provizojn. Vi aŭdis. Mi devos iri al la oficejo lundon."

Mi ne povis elpensi ion ajn por diri. Mi precize sciis lian opinionon pri la oficejo. Mi ne memoris iam esti tiom malkomforta. Estis kvazaŭ staradi kaj provi konversacii kun kamarado al kiu juĝisto ĵus donis dudek jarojn da ferio.

Kaj tiam konsolanta voĉo rompis la silenton.

"Se mi rajtus sugesti, sinjoro . . ."

Estis Jeeves. Li glatis el la ombroj kaj fiksrigardis la bildon. Mi ĵuras, ke ne estas pli bona priskribo de la frakasa efekte de la onklo Alexander de Corky ol diri, ke li igis min tute forgesi intertempe pri la ĉeesto de Jeeves.

"Ĉu hazarde mi jam menciis al vi, sinjoro, iun Sr-on. Digby Thistleton, kun kiu mi iam estis en domservo? Eble vi ekkonis lin? Li estis financisto. Li nun estas Lordo Bridgnorth. Estis lia manĉo, ke ĉiam ekzistas solvo. Mi aŭdis lin diri tion je la unua fojo post la malsukceso de patentita senharigilo kiun li reklamis."

"Jeeves," mi diris, "pri kio vi diable parolas?"

"Mi menciis Sr-on Thistleton, sinjoro, ĉar li iamaniere estis simila kazo kiel la nuna. Lia senharigilo malsukcesis, sed li ne malesperis. Li denove revendotigis ĝin sub la nomo Harajo, garantie produktanta tutan rikolton de haro post kelkaj monatoj. Oni reklamis ĝin, se vi memoras, sinjoro, per komika bildo de bilarda pilko, antaŭ kaj post preni, kaj ĝi gajnis tiom da konsiderindaj riĉaĵoj, ke baldaŭ post tio Sr-o Thistleton estis levita al tiu nobleco pro servoj al sia partio. Ŝajnas al mi, ke se Sr-o Corcoran esploras la aferon, li trovos, kiel Sr-o Thistleton, ke ĉiam estas solvo. Sr-o Worple mem sugestis la solvon de la malfacilaĵo. En la ardo de la momento li komparis la portreton al bildstrio de dimanĉa gazeto. Mi konsideras tiun sugeston ege valora, sinjoro. La porteto kiun faris Sr-o Corcoran eble ne plaĉis al Sr-o Worple kiel bildo de ties unika filo, sed mi ne dubas, ke la redaktoroj volonte konsideros ĝin kiel bazon de serio de komikaj bildoj! Se Sr-o Corcoran permesos min sugesti ĝin, liaj telentoj ĉiam estis en la kampo de humuro. Ekzistas io pri tiu bildo -- io aŭdaca kaj vigla kiu altiras la atenton. Mi certas, ke ĝi estos alte populara."

Corky rigardaĉis la bildon, farante sekan

bruon per sia buŝo. Li ŝajnis tute maltrankvile.

Kaj subite li komencis ridi sovaĝe.

"Corky, karulo!" mi diris, masaĝante lin tenere. Mi timis, ke la karulaĉo estas histeria.

Li komencis ŝanceli ĉie sur la planko.

"Li pravas! La viro absolute pravas! Jeeves, vi estas vivsavanto! Vi trafis la plej grandan ideon de la epoko! Aperi en la oficejo lundon! Komenci je la fondo de la jutnegoco! Mi aĉetos la negocon, se mi deziras. Mi konas la viron kiu estras la bildstrian sekcion de la Dimanĉa Stelo. Li ŝategos la aferon. Nur la alian tagon li menciis al mi kiom malfacile estas trovi bonan novan serion. Li donos al mi ion ajn kion mi petos por tia vera sukcesilo. Mi havas orminon. Kie mia ĉapelo estas? Mi havas dumvivan enspezon! Kie diable estas tiu ĉapelo? Pruntodonu al mi kvindolareron, Bertie. Mi volas preni taksion ĝis Park Row!"

Jeeves ridetis patre. Aŭ plibone, li spertis patran spasmon apud sia buŝo, kio estas lia plej proksima aliro al rideto.

"Se mi rajtus sugesti, Sr-o Corcoran -- kiel titolon de la serio kiun vi imagas -- 'La aventuroj de Bulbebo.'"

Corky kaj mi rigardis la bildon, kaj poste unu la alian, mirante. Jeeves pravis. Ne povus ekzisti alia titolo.

"Jeeves," mi diris. Estis kelkaj semajnoj poste, kaj mi ĵus finlegis la bildstrian sekcion de la Dimanĉa Stelo. "Mi estas optimisto. Mi ĉiam estis. Ju pli mi aĝiĝas, des pli mi konsentas kun Ŝejkspiro kaj tiuj aliaj poemuloj, ke post vetero malbela lumas suno plej hela, ktp. Prenu Sr-on Corcoran, ekzemple. Jen ulo, oni dirus, kiu dronas en maro de maltrankvilaĵoj. Oni trafis lian kolon, tute ŝajne. Tamen rigardu lin nuntempe. Ĉu vi vidis tiujn bildojn?"

"Mi arogis rigardeti ilin antaŭ ol porti al vi, sinjoro. Tute distraj."

"Ili tute trafis sukceson."

"Mi antaŭvidis tion, sinjoro."

Mi kliniĝis kontraŭ la kusenon.

"Fakte, Jeeves, vi estas genio. Vi devus ricevi procentaĵon pro tiaj aferoj."

"Mi ne rajtas plendi pri tio, sinjoro. Sr-o Corcoran estis plej malavara. Mi elprenas la brunan kompletan, sinjoro."

"Ne, mi preferas la bluan kun la malhelaj ruĝaj strioj."

"Ne la bluan kun la melhelaj ruĝaj strioj, sinjoro."

"Sed mi ŝatas vidi min portante ĝin."

"Ne la bluan kun la melhelaj ruĝaj strioj, sinjoro."

"Ho, bone, laŭ via volo."

"Ege bone, sinjoro. Dankon, sinjoro."

Kompreneble, mi scias, ke tio egalas al esti regata de ino; tamen Jeeves ĉiam pravas. Vi devas konsideri tion, fakte. Ĉne? ★

FINO

— P.G. WODEHOUSE

Tradukis: Tom ECCARDT

## Societa Kalendaro

Venu al niaj venontaj renkontiĝoj!  
Metu tiujn datojn en vian kalendaron.

**Aprilo 2007**

**20**

### ESNY KUNVENO

Ulrich Becker prelegos pri  
*Libroeldonado en Esperanto*  
Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT

**Majo**

**6**

### Tagmanĝo

*Dimanĉon, 1:00 ptm ĉe IBM Plaza*  
(Limdato por kontribuajoj por Prismo 164)

**18**

### ESNY KUNVENO

Vendredon, 6:30 ptm ĉe UFT

### United Federation of Teachers (UFT)

50 Broadway, Second Floor, Room A  
(between Bowling Green and Exchange Place)

### "IBM" Building Atrium

590 Madison Avenue (56th Street) NYC  
Street level, in the Atrium

## Pasko 2007 – Papo Benedikto la 16-a salutis en Esperanto

Dum la Paska solena ceremonio, elsendita de centoj da televidoj kaj radioj el la 5 kontinentoj, Papo Benedikto la dekseza ankoraŭfoje salutis en Esperanto. En Piazza San Pietro ĉeestis ankaŭ grupo da italaj geesperantistoj, kiuj brue kaj bunte substrekis la saluton de la Papo en la Internacia Lingvo. Pliaj detaloj kaj fotoj ĉe <http://www.ikue.org/pasko2007/pasko2007.htm>

Francesco Amerio – INFORMITALE 105  
Oficiala inform-servo de Itala Eo-Federacio

## VIVERETO de Tomekarto



"La televidantaro plinombriĝis je 50%,  
post kiam ni peniĝis la plastikajn ridetojn!"

## ESPERANTO-SOCIETO DE NOVJORKO

c/o UEA, 777 UN Plaza, NY, NY 10017 (212) 687-7041  
[http://www.geocities.com/esperanto\\_nyc](http://www.geocities.com/esperanto_nyc)

**Prezidanto**  
Stuart Green  
(631) 751-5683

**Korespondanta Sekretariino**  
Marta Bergonzoli  
(212) 599-2298

**Protokolisto**  
Jeff Blakeslee  
(718) 383-2715

**Vicprezidanto**  
Scott Page  
(212) 663-4896

**Kasistino**  
Sofiya Soskina  
(914) 813-2495

**Program-Direktoro**  
Thomas Eccardt  
(212) 477-6516

## Novjorka Prismo

Numero 163 – Aprilo 2007  
ISSN: 1059-5627

<http://members.aol.com/novjorka/prismo>

**Redaktoro**  
Jim Medrano  
(212) 982-5029

**Subredaktoroj**  
Thomas Eccardt  
Nancee Medrano

**Desegnistino**  
Mary Pulley

Sendu kontribuojn al:  
Jim Medrano, 400 East 20th Street #1B, New York, NY 10009-8103  
e-poŝto: [medrano@mac.com](mailto:medrano@mac.com)

© 2007 Esperanto Society of New York